# REZOLUCIO DE LA 58-A KONGRESO DE ILEI
## Ĉeftemo: Lingvolernado kaj Artefarita Intelekto

La 58-a Internacia Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kunveninta en Beogrado (Serbio) de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025, dediĉis sian semajnon al la temo **"Lingvolernado kaj Artefarita Intelekto"**. Kadre de la kongreso okazis ankaŭ universitata ILEI-Simpozio sub la titolo **"AI kaj Kulturo"**.

**Konsiderante ke:**

- Artefarita intelekto (AI) rapide transformas la metodojn de lingvolernado kaj instruado, kunportante novajn eblecojn kaj defiojn;
- Esperanto, kiel planlingvo kun logika kaj regula strukturo, havas unikajn trajtojn kiuj povas bone kongrui kun AI-iloj por lernado kaj tradukado;
- Estas esence esplori kiel AI povas subteni kaj plibonigi la instruadon kaj disvastigon de Esperanto, samtempe konservante la kulturajn kaj interhomajn aspektojn de lingvolernado;
- La simpozio "AI kaj Kulturo" emfazis la gravecon de etikaj, sociaj kaj kulturaj konsideroj en la apliko de AI, ankaŭ en la kunteksto de tradukado kaj arta kreado;

**La Internacia Kongreso de ILEI rezolucias:**

- **Subteni esploradon kaj evoluon de AI-rimedoj por Esperanto:** Instigi la evoluon de aplikaĵoj/apoj, platformoj kaj

rimedoj bazitaj sur AI (ekz. babilrobotoj, virtualaj instruistoj, gramatikanaliziloj kaj progresintaj neŭraj tradukiloj) por faciligi la lernadon, ekzercadon kaj uzadon de Esperanto.

- **Enkonduki AI en metodikon por instruado de Esperanto:** Esplori kaj kundividi bonajn praktikojn por la uzo de AI en lernado kaj instruado de Esperanto, rigardante ĝin kiel komplementan, ne anstataŭantan, al la homa interago kaj tradicia pedagogio.
- **Krei lernomaterialojn utiligantajn AI-teknologion:** Disvolvi kaj disvastigi novigajn edukrimedojn kiuj enplektas AI-teknologion por fari la lernadon de Esperanto pli interaktiva, tajlorita kaj efika.
- **Sentemigi onin pri etika kaj respondeca uzo de AI:** Stimuli kritikan pensadon pri la efikoj de AI en lingvolernado kaj kulturo, certigante ĝian uzon inkluzivan, justan kaj respektan al lingva kaj kultura diverseco.
- **Flegi kunlaboron inter esperantistoj kaj AI-fakuloj:** Instigi la interŝanĝon de scioj kaj spertoj inter la esperantista komunumo, esploristoj, akademianoj kaj programistoj en la kampo de artefarita intelekto, por utiligi la sinergion inter Esperanto kaj novaj teknologioj.
- **Apogi la trejnadon de instruistoj pri AI:** Proponi daŭrajn trejnadojn por instruistoj de Esperanto, por ke ili povu efike kompreni kaj uzi AI-rimedojn en sia instruado.